
# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo) エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## la 48a Zamenhof-Festo en Kanagavo!



*dec. 16, 13h00-16h30
*Placo de Kanagawa por Tergloba Civitaneco
(proksime al la Stacio Hongoodai)
Interalie estos prelego de d-ro Ulrich Lins:
“Antaŭ cent jaroj: esperoj pri nova mondo”.

## Okazis

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Senta, proksime de la Stacidomo Jokohama)

***nov. 17 [KK]** La daŭrigo de “kunveno raporti siajn spertojn”, okazinta en la 1-a de septembro: De 13h00 ĝis 15h00, 6 el niaj rondanoj parolis Esperante, kaj 1 japane. Partoprenis 16.

(Parolintoj kaj la temoj)

1. AIDA Yayoi: Amindaj Floroj — naturaj kaj artefaritaj
2. AKIYA Hideo: Artaj kaheloj kaj ceramikaĵoj de Portugalio
3. TANIGAWA Hirosi: La Ekspozicio de Ĵomona Kulturo — kune kun Bart kaj Thomas Gemeyere, belgaj esperantistoj
4. NAMBA Fumiharu: (1) De Lisbono al Parizo, (2) Penso pri problemo maldekstra/dekstra
5. MURATA Kazuyo: Pri Hasegawa Teru (en la japana)
6. SIBAYAMA Zyun’iti: Ĉu Kazino en Jokohamo?

## Niaj Planoj en 2019

***jan. 27 [KK]** La jarkunveno de nia rondo “NPO Esperanto Jokohama”.

***feb. 3 [ĉambro de la domo de JICA]** Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havos prelegon pri Esperanto.

## Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

***Regulaj Klasoj en sabato**

(1) Klaso “Eseoj”, por legi “Tamen ĝi moviĝas!” gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas “Mondo de travivaĵoj” de Tibor Sekelj, 1 fojon — libera frazfarado; kaj alian fojon — tradukado laŭ sia plaĉa fonto

***Regulaj Klasoj en merkredo**

(1) Klaso “Belĉielo”, por legi “Kuniberto kaj Kilevamba”, gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso “eriko”, por legi “Utila Estas Aliĝo” gvidate de Doi Ĉieko

***Neregula Klaso**

(1) Klaso “Belflora”: por legi "Kuniberto kaj Kilevamba", per la gvido de Doi Ĉieko, du fojojn monate

Esperanto Jokohama

■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas Esperanto Jokohama: Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nisisiba 4-17-9, Kanazawa-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-236-0017)
■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

## Letero el Ukrainio

# La Ukrainia Kongreso en 2018, kun Plako pri Eroŝenko



**Vicprezidanto de odesa esperanto-klubo "Blanka Akacio" Tamara Popova**

(Mallongigiginte leteron el Tamara Popova prezentas la Redakcio)

La delegacio de odesaj esperantistoj el la klubo "Blanka Akacio" revenis de Lvivo, kie okazis de 19 ĝis 21 de oktobro la 24-a Kongreso de Ukrainia Esperanto-Asocio. La ĉefa, tre grava temo de la 24-a kongreso estis: "Kulturoj: nacia kaj Esperanto – la vojo al dialogo". Cetere, odesanoj gastigis la 23-an Kongreson en 2017.

Krome, la kongreso dediĉis al la malfermo de memora plako pri elstara ukrainia kaj japana esperantisto, poeto, rakontanto, instruisto Vasilij Eroŝenko, kiu, estante blinda, vojaĝis al multaj landoj de la mondo, dank' al sia scio pri Esperanto. La plakon kun la subteno de la Lviv-Urbodomo oni pendigis sur la strato de la nomo Vasilij Eroŝenko, ĉe la domo N-ro 11. La kongresaj partoprenantoj estis esperantistoj el urboj de Ukrainio (Kievo, Lucko, Odeso, Ternopilo, Lvivo), kaj ankaŭ - el Nederlando, Pollando, Litovio, Israelo. Solena evento de la 24-a okazis en escepte bela kaj komforta halo de Lviva Domo de Sciencistoj.

Oni restas nur surprizita kaj admirata, kiel bone la organiza komitato de la kongreso, konsistanta nur el 7 homoj, sukcesis organizi oficialan malfermon en tiu bela kaj prestiĝa loko, en la centro de Lvivo! En la malferma ceremonio de la Kongreso aŭdiĝis salutoj de eksterlandaj esperantistoj kaj neesperantistaj organizoj.

Informoj estis aŭditaj, i.a. «La vivo kaj laboro de la blinda esperantisto Vasilij Eroŝenko kiel ekzemplo de interkultura dialogo», de Eŭheno Kovtonjuk, Prezidanto de la Ukraina E-Asocio kaj de la Bonkora Fonduso, nomata fare de Vasilij Eroŝenko. Dank' al liaj penoj, la administracio de Lvivo konsentis establi monumentan plakon.

La inaŭguro finiĝis kun teo, kiun oni trinkis en unu el la salonoj de la Domo de Sciencistoj. Aliĝo de partoprenantoj, vendado de Esperanto-literaturaĵoj kaj la unua ĝenerala foto sur la eleganta ŝtuparo de la palaco ankaŭ estis montritaj tie.

La sekvaj du tagoj estis dediĉitaj al trejnado de aktivistoj de la Esperanto-movado en Sudorienta Eŭropo. Ĝi estis 52-a AMO-seminario. Ĝi estis tre informa kaj utila por aŭskultantoj, efektivigita fare de UEA-Vicprezidanto Stefan McGill kaj UEA Ĉefdelegito O. Griŝĉenko.



Stefan McGill

Ekskursojn «Ĉirkaŭvojo de la mezepokaj stratoj de Lvivo» kaj «La Liĉakova Memoria Tombejo» gvidis la membro de la organiza komitato Antonina Kalaŝnik tre lerte kaj en bela Esperanto .

Kongresaj partoprenantoj profunde dankas pro la bonega organizo de la kongreso al la tuta organiza komitato; aparte al E. Kovtonjuk, V. Pacjurko, O. Griŝĉenko kaj, same - al la prezidanto de la Lviva-klubo «Primavero» Z. Peliot, ĝia vicprezidanto V. Voroblevskj, Stefan McGil, Nina Daniljuk.

Kuraĝigitaj de la partopreno en la Lviv-Kongreso, odesanoj, plenaj de novaj ideoj por la antaŭenigo kaj disvastigo de Esperanto, ekplanis literaturan kaj muzikan programon en odesa biblioteko nome de I. Franko, pri la temo: "Esperanto estas mia amo".



## Eseo

# Ceramikaj Artoj de Portugalio

**AKIYA Hideo**

### azuleĥo

Somere 2018 mi vojaĝis al Portugalio por la unua fojo, por partopreni en la 103-a Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono. Dum la kongresa semajno mi vizitis diversajn lokojn en la urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kaj sentis iom da etoso de la portugala kulturo. Poste rigardante fotojn de la vojaĝo, mi multe trovis tiujn de ceramikaj artaĵoj.

Tipo de ceramikaĵoj en Portugalio estas azuleĥo, kiu estas glazurita kahelo ornamita per kolora bildo. Oni ofte vidas azuleĥojn sur multaj konstruaĵoj. Azuleĥo estas unu el la distingaĵoj de la portugala arkitekturo. Tipa ekzemplo estas la preĝejo en la Universitato de Koimbro (foto),



kiu situas ĉ. 200 kilometrojn norde de Lisbono. Ĉiu interna muro de la ĉambro estas tute kovrita per multaj azuleĥoj sen spaceto. Malgrandaj, kvadrataj kaheloj kun geometriaj aŭ ŝajne floraĵaj desegnaĵoj ĉefe bluaj estas ripete metitaj. Mi vidis similajn dekoraciojn per ripetitaj kaheloj ankaŭ en la Nacia Palaco de Pena kaj la Nacia Palaco de Sintra, ambaŭ en la urbo Sintra, ĉirkaŭ 28 kilometrojn okcidente de Lisbono.

Krom la ripetado de identaj kaheloj, troviĝas alia stilo de azuleĥo. Unu granda bildo estas elfarita per muntado de pecaj bildoj. Interalie, la granda azuleĥa murbildo de la halo en la Palaco de Sintra (foto) vere admirigis min. Tuto da muroj pli ol tri metrojn altaj estas okupita de bildoj el nur bluaj azuleĥoj, kiuj montras scenojn ŝajne en la vivo de la reĝa familio. Tio, kio impresis min estas la perfekta aranĝo de ĉiuj bildpecoj sen difekto, kaj ilia homogena, blua koloriĝo. Tio certe originas de la altnivela lerteco de la artistoj kaj metiistoj.

Ankaŭ diverskoloraj azuleĥoj ne nur bluaj ekzistas. Granda kahela bildo titolita Fogo (Fajro) en la metrostacidomo de Saldanha (foto) estas multkolora kun ruĝo, bluo, flavo, orkoloro,




kafobruno, indigo ktp. Ĝi estas tre bela, alloga nuntempa artaĵo, mi sentas. Kontraŭe, la plej simpla azuleĥa bildo troviĝas sur la koridoro en la metrostacidomo de Cidade Universitária (urbo universitata), la plej proksima stacio de la kongresejo, la universitato de Lisbono. La bildo estas el blankaj kaheloj kun nur nigraj literoj, zigzage enkadrigita per nigraj, desegnitaj kaheloj. La literoj montras la vorton de la fama antikva filozofo Sokrato. Li diras, “Mi estas nek atenano, nek greko, sed unu civitano de la mondo.” Ŝajnas al mi, ke tiu frazo estas plej konvena por la “universitata urbo.”



← Palaco de Sintra

### Bordallo Pinheiro

Krom la azuleĥo ekzistas alia tipo de ceramika arto. Kiam mi vizitis la Muzeon de Lisbono aŭ la Palacon de Pimenta, mi hazarde renkontiĝis kun tiaj artaĵoj en la korto de la muzeo. La korto estas plena de verdaĵoj, kaj tie ludis familioj de pavo. Mi promenadis ombrejon ĝuante vidon de la pavoj, kaj eniris en angulon de la korto, kie min atendis multaj ceramikaj artobjektoj de vivaĵo. Grandaj insekto kaj serpento salutas el arbusto. Fungoj kreskas sub la ombro, kaj eble taŭgus kiel benketoj. Lacertoj suprenrampas sur arboj kaj muroj, ankaŭ heliko sur la muro. La sola lupo ululas al ĉielo. Ĉiuj ŝajnas tute realaj krom siaj mezuroj. Ili amuzas kaj ridetigas spektantojn. La angulo estas nomata Jardim Bordallo Pinheiro (Ĝardeno de Bordallo Pinheiro).

Antaŭ ĉi tiu vojaĝo mi ne multe sciis pri Rafael Bordallo Pinheiro (1846-1905). Li estas talenta artisto en diversaj kampoj de la portugala kulturo en la 19-a jarcento, kaj produktis multe da ilustraĵoj, kartunoj, karikaturoj, skulptaĵoj, kaj ankaŭ artaj ceramikaĵoj. Trans la avenuo antaŭ la Muzeo de Lisbono troviĝas la Muzeo de Bordallo Pinheiro. En la muzeo troviĝas multe da liaj verkaĵoj en diversaj kampoj. Interalie, dekoraciaj kaheloj, ĝardenaj skulptaĵoj kaj aliaj diversaj ceramikaĵoj estas tre interesaj. Sur preskaŭ ĉiuj ceramikaĵoj oni povas trovi malgrandajn legomojn, birdojn, aŭ aliajn miniaturajn vivaĵojn. Komuna motivo estas vivo aŭ naturo. Delikata kaj realisma formo, fajna finfaro kaj plena originaleco de liaj verkaĵoj vere valoras. Poste mi eksciis, ke li fondis fabrikon de ceramikaĵoj 1885 en la urbo Caldas da Rainha. La urbo nun fariĝis ĉefa produktloko de ceramikaĵoj en Portugalio. La nomo "Bordallo Pinheiro" estas la fama fabrikmarko de la portugala porcelanaĵo.






### Plu voĉlegita de 3ZZZ

Post nia n-ro 337, ni prezentas voĉlegitajn materialojn de la aŭstralia elsendo 3ZZZ, aŭskultebla de http://melburno.org.au/3ZZZradio/

(1) 18a de jun.; el n-ro 337, pri la libro Songô de Akutagaŭa Rjunosuke tradukita de Aida Yayoi
(2) 6a de aŭg.; el n-ro 335 kaj el Vikipedio, pri William Copeland kaj bierfarado
(3) 3a de sept.; el n-ro 339, recenzo de Aida Yayoi de "La nanoj en domo kun granda zelkovo"
(4) 8a de okt.; el n-ro 340, Feliĉan naskiĝtagon al "Kotonoha Amrilato", de Sibayama Zyun'iti
(5) 22a de okt.; el n-ro 339, La poŝtoficejo por drivintaj aĵoj, de Doi Ĉieko

### kondolence

Saluton!

Koran dankon, ke vi regule sendas al mi vian organon.

En tiu ĉi lasta numero mi legis pri la forpaso de Sinjorino Hirose Kanae. Mi konatiĝis kun ŝi en La Chaux-de-Fonds, kiam mi estis tutkomencanto. Mi revidis ŝin en iu kongreso en la lastaj jaroj.

Bv transdoni al ŝia familio miajn elkorajn kondolencojn.

salutas kaj dankas

Mireille Grosjean